

Itala Fervojisto



Il Ferroviero Italiano

2021 / 06 (1)



Inversigebla substacio (por energia reutiligo)

Sottostazione reversibile (per recupero energetico)

Informa Bulteno (por la disvastigo de Esperanto)

Bollettino di Informazione (per la diffusione della lingua internazionale Esperanto)

Quote - Materiali	€
IFEA/IFEF (tutti)	25,00
FEI (ordinario)	30,00
FEI (giovane o familiare)	15,00
DLF (Effettivo, in servizio o pensione)	12,00
DLF (Aderente = familiare)	12,00
DLF (Giovane)	6,00
DLF (Frequentatore)	17,00
Circolo Culturale Gruppo E-o Bologna	8,00
<i>Lessico Ferroviario RailLex</i>	8,00
<i>Historio de la Fervoĵista E.o-Movado</i>	3,00
<i>Historio de IFEF 1909-1984</i> *	3,00
<i>Suplemento al Historio 1984-1999</i> *	3,00
<i>NomListoj el la Historia broŝuroj</i> *	2,50
<i>Suplemento al Historio 1999-2019</i> *	#
<i>Statuto kaj Regularo IFEF</i> *	#
<i>L'E-o in Emilia Romagna</i>	7,00
<i>Introduzione alla conoscenza dell'E.o</i> *	3,00
<i>Vivo kaj morto de monumuo</i>	1,50
<i>Catalogo Fondo Librario BO</i>	4,00
* <i>Pubblicazioni ricevibili gratis per posta elettronica.</i>	
# <i>Pubbligate sul sito www.ifef.net</i>	

Minimo 3 copie = prezzo di 2.
 Rivolgersi a Bolognesi Romano:
 ✉ Via Misa 4, IT-40139 Bologna,
 ☎ ++39 051 547 247,
 📧 <bolognesiromano@alice.it>

La legantoj estas varme invitataj kunlabori per artikoloj, informoj, sugestoj.
La Redakcio
 I lettori sono invitati a collaborare inviando articoli, notizie, suggerimenti.
 La Redazione

Attenzione: la quota 2021 resta di **25,00 €**.
 I ritardatari 2020 versino per i 2 anni 50,00 €.
 L'ultimo anno pagato compare sull'invio.
 Vedere a lato le possibilità di adesioni e le offerte di pubblicazioni o varie altre cose.
Attenzione: il Numero del Conto Corrente Bancario del Segretario IFEA è il seguente:
 Vito Tornillo c/o Banca INTESA Zola Predosa (BO)
IBAN IT 31 U 03069 37133 10000001497
Rinnovate subito la quota:
 l'IFEA potrà così meglio programmare e operare.
 Segnalate sempre:
causale, cambio di dati e di indirizzo!
Fate iscriver e un collega, un familiare, un amico, un samideano: dobbiamo crescere in qualità, ma anche in quantità.
Il Cassiere

<i>E n h a v o</i>	<i>Paĝo</i>
Quote - Materiali // <i>Enhavo</i>	2
Note di redazione...	3
<i>HYPERLOOP: Il primo test con persone a bordo del treno iperveloce di VIRGIN</i>	4
<i>HIPERLOOPO: La unua testo kun homoj sur la hiperrapida trajno de VIRGIN</i>	5
Il trasferimento della capitale d'Italia da Torino a Firenze ...	6
<i>La traslokigo de la ĉefurbo de Italio de Torino al Florenco ...</i>	7
Torino-Aeroporto Caselle in meno di 30'.	8
<i>Torino-Caselle Flughaveno en malpli ol 30'</i>	9
Il treno parte e ci porta lontano ...	10
<i>La trajno startas, kaj nin forkunportas ...</i>	12
La frenatura dei treni produce energia.	15
<i>Trajnbremasado produktas energion.</i>	16
Linea AV/AC Napoli-Bari	18
Stato dei lavori e prospettive future	20
<i>Linio Napoli-Bari AV/AC</i>	
<i>Verkostato kaj estontaj perspektivoj</i>	
<i>Necrologi / Nekrologoj</i>	23
Vita dell'IFEA	24-25
<i>Rime / Rimaĵoj</i>	26
<i>Anekdotoj / Anekdotoj</i>	28
<i>Lo sapevi? / Ĉu vi sciis?</i>	31
<i>Facezie / Humuraĵoj</i>	34
<i>Proverbi / Proverboj</i>	37
<i>Aforismi sulle lingue / Aforismoj pri lingvoj</i>	38
<i>Gioco di parole / Vortludo</i>	39
<i>Kolofono // Leggere l'E-o</i>	40

Note di redazione...

Cari *samideani*,
una insolita situazione relativa alla salute di tutti nel mondo ci vede sottoposti a gravi pericoli e ci impone pesanti regole e comportamenti davvero impensabili fino a poco tempo fa.

Ce ne ricorderemo per tutta la nostra vita e lo racconteremo ai più giovani. Auguriamoci di non essere mai toccati da tale strano e inafferrabile morbo e speriamo che presto si trovi il modo di debellarlo definitivamente, così da poter riprendere i nostri usuali contatti e normali modi di vivere.

All'inizio di questo numero ecco la notizia di una tecnologia detta Hyperloop. Essa prometterà di trasportare beni e persone all'interno di tubi a bassa pressione, tramite levitazione magnetica, a grande velocità anche fino a circa 1200 km/h.

Un primo esperimento si è svolto con due volontari a bordo della capsula sperimentale *Pegasus*, o *XP-2*.

Un resoconto storico ricorda il trasferimento in treno nel 1865 della capitale d'Italia da Torino a Firenze attraverso il favoloso paesaggio appenninico fra l'Emilia e la Toscana.

Il brano successivo anticipa una connessione di livello europeo che riguarda il Piemonte.

Nel 2023 l'aeroporto di Caselle e la città di Torino saranno collegati in meno di mezz'ora, grazie a un treno ogni 15 minuti, adeguando la linea ferroviaria Torino-Ceres.

Poi, ecco una bella serie di ricordi di viaggio e di partecipazioni giovanili alla interessante e spesso imprevedibile e particolare vita di tipo internazionale

offerta dalla conoscenza e dall'uso dell'Esperanto.

A quei viaggi grande e insostituibile è stato il ruolo della ferrovia e dell'uso del treno che hanno favorito conoscenze ed esperienze dirette e indimenticabili.

A seguire c'è un interessante articolo che riferisce come si possa recuperare energia dalla frenatura dei treni, addirittura per accendere luci cittadine.

Si tratta di un tipo di investimento tecnologico che può ben partecipare e collaborare alla protezione ambientale.

Un'altra buona notizia riguarda la serie di qualificanti lavori nella tratta rinnovata e ad Alta Velocità fra Napoli e Bari, parte integrante del Corridoio Ferroviario Europeo TEN-T Scandinavia-Mediterraneo.

Si tratta di un prezioso esempio di opera strategica per lo sviluppo economico del Sud e dell'intero Paese.

Il Congresso IFEF 2021, mantenuto sempre a *Frankfurt (O)* / *Shubice*, non avvenuto in presenza, ha offerto un valido esempio di nuove interessanti possibilità organizzative in rete, da considerare anche per il futuro.

Nel 2022 l'IFK sarà a Beroun (Čechio).

Infine, come di consueto, c'è l'invito a riflettere, durante qualche breve momento di questa frenetica vita, sui proverbi, gli aforismi, le curiosità più diverse.

Per elevare lo spirito ci sono poesie e per tenere alto il morale ecco battute e vignette.

La mescolanza di generi raccoglie consensi perché anche in questo modo viene data un'ulteriore prova della grande capacità e duttilità della lingua internazionale nel rendere lo spirito di diversi dialetti, lingue e culture.

Avanti Esperanto! □

HYPERLOOP: IL PRIMO TEST CON PERSONE A BORDO DEL TRENO IPERVELOCE DI VIRGIN

Hyperloop è una tecnologia che promette di trasportare beni e persone all'interno di tubi a bassa pressione, tramite levitazione magnetica, a velocità fino a un massimo di circa 1200 km/h.

Il primo a proporre il concetto di *Hyperloop* nel 2012 fu *Elon Musk*, che ha permesso a chiunque volesse di svilupparne la propria versione.

L'8 novembre *Virgin Hyperloop* ha dimostrato il funzionamento in sicurezza di questa tecnologia nel corso del primo esperimento svolto con 2 persone a bordo.

I due volontari si sono seduti all'interno della capsula sperimentale *Pegasus*, o XP-2, e hanno percorso il breve tragitto di 500 m nel deserto del Nevada in 6,25 secondi, a una velocità massima di 172,8 km/h.

La capsula è stata immessa in una camera di decompressione in attesa della creazione del vuoto (Nel tubo la pressione è di 100 Pa, 1000 volte inferiore alla pressione atmosferica), ed è poi entrata nel tubo dove ha trasportato per la prima volta 2 passeggeri.

Le accelerazioni subite dai due passeggeri non sono state eccessive, "è come guidare un'auto sportiva in rettilineo", ha detto uno dei due.

Ma l'obiettivo dell'esperimento era dimostrare che chiunque può viaggiare in sicurezza a bordo di una capsula *Hyperloop*, ed è stato raggiunto.

Se *Hyperloop* viaggiasse alle altissime velocità che in teoria può raggiungere, i tempi di spostamento da una località all'altra potrebbero ridursi enormemente rispetto a quelli attuali, permettendo ad esempio di andare da Los Angeles a San Francisco in meno di 30 minuti, o da Milano a Malpensa in 10 minuti.

Inoltre, una commissione sulla mobilità del futuro dell'Ohio stima che in 30 anni, un *hyperloop* che colleghi Chicago, Columbus e Pittsburgh diminuirebbe di 1,9 miliardi i viaggi in auto e camion, riducendo le emissioni di carbonio di 2,4 milioni di tonnellate e generando 300 miliardi di dollari di benefici economici.

Fonte: "Pegasus", Virgin Hyperloop





HIPERLOOPO: LA UNUA TESTO KUN HOMOJ SUR LA HIPERRAPIDA TRAJNO DE “VIRGIN”

Hyperloop estas teknologio, kiu promesas transporti varojn kaj homojn en tuboj kun malaltprema aero, per magneta levitado, kun rapidoj ĝis maksimume ĉirkaŭ 1200 km/h.

La unua, kiu proponis la koncepton *Hyperloop* en 2012, estis *Elon Musk*, kiu permesis al ĉiuj, kiuj volas, disvolvi sian propran version.

La 8an de novembro (2020), *Virgin Hyperloop* montris la sekuran funkcion de ĉi tiu teknologio dum la unua provo farita kun 2 homoj surtrajne.

La du volontuloj sidis ene de la eksperimenta kapsulo *Pegazo*, aŭ XP-2, kaj kuris la mallongan 500-metran veturadon en la dezerton de Nevada, Usono, en 6,25 sekundoj, maksimuma rapideco de 172,8 km/h.

La kapsulo estis metita en malkunpreman ĉambiron atendente la kreon de la vakuo (en la tubo la premo estas 100 Pa, 1000 fojojn pli malalta ol atmosfera premo), kaj poste eniris la tubon, kie ĝi transportis la 2 pasaĝerojn por la unua fojo.

La akcelo suferita de la du pasaĝeroj ne estis troa, "ĝi similas al veturado de sportaŭtomobilo sur rekta linio", diris unu el la du.

Sed la celo de la testo estis pruvi, ke iu ajn povas vojaĝi sekure en kapsulo *Hyperloop*, kaj tio estis atingita.

Se *Hyperloop* veturus je la tre grandaj rapidoj, kiujn teorie ĝi povas atingi, la tempoveturadoj de unu loko al alia povus multe redukti kompare kun la nunaj, permesante, ekzemple, iri de *Los-Angeles* al *San Francisco* en malpli ol 30 minutoj, aŭ de *Milano centro* al *Malpensa* flughaveno en 10 minutoj.

Aldone komisiono de *Ohio* pri "Moviĝemo de la Estonteco" taksas ke post 30 jaroj da kunligoj per *Hiperloop* tra Ĉikago, Kolumbo kaj Pitsburgo oni malaltiĝus veturadon de aŭtoj kaj kamionoj je 1,9 miliardoj kaj reduktus karbonajn emisiojn je 2,4 milionoj da tunoj, generante 300 miliardojn da dolaroj en ekonomiaj avantaĝoj.

(Fonto: "Pegazo", *Virgin Hyperloop*
Video: https://www.youtube.com/watch?v=xKvbSboQ5_g&feature=emb_logo)
(Trad. ViTo)

IL TRASFERIMENTO DELLA CAPITALE D'ITALIA DA TORINO A FIRENZE ...

... avvenuta tra i boschi dell'Appennino!

"1865 - 3 febbraio. Bologna.

Alle 15,30 il Re, partito da Torino alle 8,45 del mattino, transita dalla stazione di Bologna diretto, via Porrettana, a Firenze, nuova Capitale del Regno d'Italia, dove si trasferirà definitivamente.

I resoconti dell'epoca descrivono con espressioni quasi da fiaba il suo passaggio attraverso l'Appennino, in quella rigida serata invernale del 3 febbraio 1865, a bordo del suo Treno Reale illuminato da lampade di cristallo, composto da 9 splendide carrozze istoriate ...

Immaginiamo oggi quale possa essere stata la meraviglia suscitata, tra i semplici montanari di quei luoghi impervi e solitari, dal passaggio di quel treno unico e straordinario, illuminato all'interno delle sue raffinate vetture da luci variopinte ... che all'improvviso, come un bagliore, sfilava loro davanti nella oscurità della notte ... mentre la brina serale si depositava sui binari: sicuramente una visione degna di una fiaba, di cui avremmo poi conservato un indimenticabile ricordo per il resto della vita!

Il Convoglio Reale giungerà poi a Firenze alle 22,45 di quella sera, accolto dalle acclamazioni della folla che lo

aveva lungamente atteso: la piazza della stazione Maria Antonia si presenterà illuminata a giorno a causa della gran luminaria, con un'immensa folla che farà ala lungo tutto il percorso fino a Palazzo Pitti.

Il Re, commosso dall'accoglienza, abbraccerà le autorità e saluterà con larghi sorrisi i Fiorentini, residenti, da quel giorno, nella nuova Capitale del Regno."



Nelle immagini:

- la Vettura Reale del Re Vittorio Emanuele II (le cui iniziali, erano riportate al centro dei due rosoni delle porte) costruita dall'ebanista piemontese Capello (Dal mio libro "Treno Reale").

- l'unico disegno giunto fino a noi del primo Treno Reale, composto da 5 vetture in legno, creato per l'Inaugurazione della Torino Genova del 20.02.1854. □

(Da mio libro "Treno Reale")
(Testo e disegni: Archivio Maurizio Panconesi)

LA TRANSLOKIGO DE LA ĈEFURBO DE ITALIO DE TORINO AL FLORENCO ...

... kiu okazis tra la arbaroj de Apeninoj!
"1865 - 3-an de februaro. Bolonjo.

Je la 15.30 horo la Reĝo, foririnte de Torino je la 8.45 matene, transiris de la stacidomo de Bolonjo direktita, laŭ la *Porrettana* fervoja linio, al Florenco, la nova ĉefurbo de la Regno de Italio, kie li translokiĝis definitive; la tiamaj rakontoj priskribas per preskaŭ fabelaj esprimoj lian trairon tra la Apeninoj, en tiu severa vintra vespero de la 3a de februaro 1865,

sur lia Reĝa Trajno prilumita per kristalaj lampoj, konsistanta el 9 belegaj surdesegnitaj vagonoj ...

Ni ja provu imagi hodiaŭ, kio povus esti la mirindaĵo vekita, inter la simplaj montaranoj de tiuj neatingeblaj kaj izolaj lokoj, per la trairejo de tiu unika kaj eksterordinara trajno, lumigita en ĝiaj rafinitaj vagonoj per koloraj lumoj ... kiuj subite, kiel brilo, marŝis laŭvice antaŭ ili en la nokta mallumo ... dum la vespera prujno deponiĝis sur la reloj: certe vizio inda je fabelo, pri kiu ili tiam konservos neforgeseblan rememoron dum tuta vivo!

La Reĝa Vagonaro poste atingis Florencon je la 22a horo kaj 45 minutoj tiun vesperon, salutita de la aklamado de la

homamaso, kiu atendis ĝin de longa tempo: la placo de la stacidomo Maria Antonia aperis lumigita tage per la granda festlumaro, kun grandega homamaso kiu akompanis ilin dum la itinero ĝis *Palazzo Pitti*.

La Reĝo, kortuŝita de la bonvenigo, ĉirkaŭbrakis la aŭtoritatojn kaj salutis la florentanojn per larĝaj ridetoj, ekde tiu tago loĝantaj en la nova ĉefurbo de la Regno.



En la bildoj:

- la Reĝa Vagono de Reĝo *Vittorio Emanuele II* (kies inicialoj estis evidentaj en la centro de la du pordaj rozonoj) farita de la piemonta meblisto *Capello*.

- la sola desegnaĵo alveninta al ni pri la unua Reĝa Trajno, konsistanta el 5 lignaj vagonoj, konstruitaj por la inaŭguro de la fervoja linio Torino - Ĝenovo la 20an de februaro 1854. □

(El mia libro "Reĝa Trajno").
(Teksto kaj desegnoj: Arkivo Maurizio Panconesi)
(Trad. Vito)

Torino-Aeroporto Caselle in meno di 30 minuti. Dall'UE 15 milioni per potenziare la linea.

Una connessione di livello europeo per il Piemonte.

Nel 2023 l'aeroporto di Caselle e la città di Torino saranno collegati in meno di mezz'ora con un treno ogni 15 minuti.

Il progetto si realizzerà con il finanziamento europeo del programma CEF (*Connecting Europe Facility*) di circa 15 milioni a sostegno della interconnessione del centro urbano con l'aeroporto di Caselle attraverso l'adeguamento della linea ferroviaria Torino-Ceres.

Grazie all'impegno di 180 milioni da parte della Regione Piemonte, a cui si aggiungono circa 15 milioni di fondi europei CEF, la linea ferroviaria Torino-Ceres consentirà di collegare Caselle con il centro città e l'alta velocità, da una parte, e con le Valli di Lanzo, dall'altra.

La linea si atterrerà a Ciriè per completare un'infrastruttura utile anche alle Valli di Lanzo. Il progetto prevede, tra le opere principali, la costruzione di una galleria lunga circa 2700 metri lungo l'asse di corso Grosseto a Torino, nel tratto tra Parco Sempione e largo Grosseto, che raccorderà ad ovest la ferrovia

Torino-Ceres e ad est la stazione Rebaudengo del passante ferroviario.

Sarà inoltre realizzata una fermata sotterranea Grosseto che andrà a sostituire l'attuale Fermata Madonna di Campagna, non più compresa nel percorso della nuova linea ferroviaria.

L'intera area di superficie interessata dai lavori fa parte di un progetto di revisione della viabilità metropolitana e sarà completamente riqualificata, anche grazie all'abbattimento dei cavalcavia e la costruzione di un sottopasso viario lungo l'asse torinese Corso Grosseto-Corso Potenza.

Il finanziamento servirà, anche, per progettare e realizzare il sistema di controllo della marcia del treno (SCMT) che ha il compito di mantenere in sicurezza tutta la linea.

Sono previsti, inoltre, interventi per riorganizzare le aree di parcheggio a raso e la realizzazione di una pista ciclabile.

Il servizio ferroviario sulla linea storica Torino Ceres è stato sospeso per i lavori in corso ed è effettuato da un servizio bus sostitutivo. □

(Da Trasporti-Italia.com)



Torino-Caselle Flughaveno en malpli ol 30 minutoj. 15 milionoj da eŭroj de EU por plibonigi la linion.

Eŭrop-nivela kunligo por Piemonte.

En 2023 la flughaveno *Caselle* kaj la urbo Torino estos konektotaj en malpli ol duonhora kun trajno ĉiun 15 minutojn.

La projekto estos efektiviĝota per eŭropa financado de la programo CEF (*Connecting Europe Facility*) kun ĉirkaŭ 15 milionoj por subteni la kunligon de la urba centro kun la flughaveno *Caselle* per la adaptigo de la fervoja linio *Torino-Ceres*.

Danke al la devontigo de 180 milionoj da eŭroj fare de la Piemonta Regiono, krom ĉirkaŭ 15 milionoj da eŭropaj CEF-fondusoj, la fervoja linio *Torino-Ceres* ebligos ligi *Caselle* kun la urbocentro kaj la rapidtrajnoj je unu flanko kaj kun la *Lanzo-Valoj* en la alia flanko.

La linio haltos en *Ciriè* por kompletigi infrastrukturon kiu utilas ankaŭ por la *Lanzo-Valoj*. La projekto inkluzivas, inter la ĉefaj laboroj, la konstruadon de tunelo longa ĉirkaŭ 2700 metrojn laŭ la akso de *Corso Grosse*to en Torino, en la sekcio inter *Parco Sempione* kaj

Largo Grosseto, kiu kunligos okcidente la fervojon *Torino-Ceres* kaj oriente la *Rebaudengo*-stacio de la fervoja ĉirkaŭringo.

Estos konstruita ankaŭ subtera haltejo ĉe strato *Grosseto* kiu anstataŭigos la nunan haltejon *Madonna di Campagna*, ne plu inkluzivitan en la itinero de la nova fervoja linio.

La tuta areo interesata de la vorkoj estas parto de projekto pri revizio de metropola trafiko kaj estos tute renovigota, ankaŭ danke al la malkonstruo de la superpasejoj kaj la konstruado de subpasejo laŭ la torina akso *Corso Grosseto-Corso Potenza*.

La financado ankaŭ estos uzata por projekti kaj efektiviĝi la trajnan kontrolan sistemon (SCMT), kiu havas la taskon

gardi la tutan linion sekure.

Intervenoj ankaŭ estas planitaj por reorganizi la stratnivelaĵajn park-areojn kaj la konstruadon de bicikla vojo.

La fervoja servo sur la historia linio *Torino Ceres* estas fermata pro la disvolviĝantaj laboroj kaj efektiviĝota per anstataŭa bus-servo. □

(Trad. ViTo)



IL TRENO PARTE E CI PORTA LONTANO ...

Di quanti chilometri ferroviari mi racconta la mia vita nel movimento? Non riesco nemmeno a indovinare la quantità, ma nel mio cuore rimane la qualità di questi viaggi e voglio parlarne un po'.

Un aereo è più veloce di un treno, di solito, ma su un percorso ferroviario si vedono i cambiamenti: del territorio, delle persone che entrano ed escono dal vagone, delle stazioni, delle lingue, parlate o scritte sui tabelloni, degli odori dei pasti che porti: vivi il viaggio che diventa parte essenziale dell'avventura. Ho iniziato l'attività nel 1971, e già dall'inizio abbondavano i viaggi, soprattutto nella mia regione, quindi in treno.

Allora gli aerei erano costosi, così gradualmente mi sono abituato a viaggi di più ore: il mio primo viaggio all'estero, nel 1979, è stato al Congresso Internazionale della Gioventù a Utrecht, nei Paesi Bassi, ed è durato dieci ore; quando il treno ha raggiunto Bruxelles, il mio vagone, l'unico con destinazione Amsterdam, è rimasto isolato in mezzo allo scalo ferroviario per *mooolti* minuti, in attesa della locomotiva che ci ha collegati al treno successivo.

L'anno successivo ho affrontato un lungo viaggio ai congressi in Scandinavia, il primo IJK a Rauma (Finlandia) e il secondo UK a Stoccolma (Svezia).

Il viaggio è stato divertente, con gli amici e tante avventure, come quando, ad Amburgo, siamo scesi dal vagone dalla parte sbagliata e siamo rimasti soli in mezzo ai binari, sul marciapiede di servizio, davanti agli attoniti tedeschi ... Proprio durante l'UK mi raggiunse la notizia dell'attacco terroristico alla stazione della mia città, Bologna, e iniziai il viaggio di 42 ore verso casa, con pochissimi soldi in tasca (i paesi congressuali erano più costosi di quanto previ-

sto), e con il cuore pesante, perché non ero stato in grado di contattare la mia famiglia, che avrebbe dovuto partire per le ferie in quello stesso giorno, più o meno a quell'ora.

Dormii nel corridoio perché gli scompartimenti erano troppo costosi.

L'arrivo nella mia stazione semidistribuita, nel cuore della notte, è qualcosa di indimenticabile, con l'equivalente degli 83 centesimi di euro di oggi come ultime monete, ma di quattro valute.

Tanto per sapere, la mia famiglia stava bene, essendo riuscita - per puro caso - a viaggiare un giorno prima.

I telefoni cellulari esistevano ancora a malapena nella mente dei loro inventori: quanto sono fortunati i viaggiatori di oggi!

Nel 1981 ho viaggiato spesso in treno tra Bologna e Porretta, cittadina di montagna, 60 chilometri a sud, dove ho organizzato il Festival Internazionale della Gioventù IEJ: il più delle volte, i vagoni più economici, di terza classe, erano i cosiddetti "Cento porte", vecchissime carrozze con sedili in legno e una decina di porte su ogni lato. In una occasione, io e i miei genitori abbiamo viaggiato con il treno a vapore "con antichi vagoni speciali", che erano esattamente ... sì, le "Cento porte" della settimana precedente.

Nello stesso anno ho utilizzato il biglietto Interrail, valido per un mese per i giovani, per un viaggio di un mese attraverso la Spagna, e solo quando sono arrivato lì, ho appreso che si potevano usare solo i treni locali senza costi aggiuntivi, e ho attraversato il paese ad una velocità media di 20 km/h.

Ricordo quasi ogni singolo chilometro, dalla fermata in mezzo al nulla per far entrare un contadino con due galli in mano, alla lunga curva in mezzo a un

vigneto dove due compagni di viaggio scesero dal treno, corsero tra gli alberi e rientrarono dall'altro lato del treno, ai buchi nel muro della ritirata attraverso i quali potevi salutare gli amici mentre tu ... sì, lo sai; fino alla festa zingara di notte, a lato di una stazioncina in Andalusia, quando con difficoltà sono riuscito a non perdere il treno.

Durante un viaggio per una riunione del consiglio di IEJ, a Pisa, entrai in uno scompartimento vuoto, e iniziai a leggere un libro: percepii l'ingresso di altri compagni di viaggio e uno strano silenzio che mi circondava.

Alzai gli occhi dal mio libro, "L'origine delle specie di Charles Darwin", per rendermi conto che ero l'unico non prete nello scompartimento.

Il 1983 fu l'anno del mio 26° compleanno, che doveva avvenire a settembre, quindi ebbi l'opportunità di beneficiare ancora del biglietto Interrail.

Dall'Italia all'Ungheria, per l'IJK a Debrecen e l'UK a Budapest, e da lì ad Atene per "classicheggiarmi" in mezzo alla storia, dormendo sulla terrazza della "Helena Esperanto Asocio".

E, da lì, il viaggio più avventuroso della mia vita, fortunatamente con una carissima amica: non sarei sopravvissuto se avessi viaggiato da solo.

Vale a dire, lasciammo Atene per Salonicco, dove spendemmo le ultime dracme.

Da Salonicco un altro treno per Belgrado, in vagoni non troppo puliti, dove l'unico posto libero per dormire era sedersi nella latrina del vagone, la cui porta non era fissata, e mi bussarono più volte in testa durante la notte (ovviamente lasciai l'unico posto che avevamo trovato alla mia compagna di viaggio).

Arrivati a Belgrado, prendemmo un altro treno stipato per Zagabria, e quella seconda notte ho ringraziato le carrozze tedesche di quel treno, con i loro intercomunicanti larghi e corti, dove ho po-

tuto tranquillamente dormire dalla vita in su in una carrozza, e dalla vita giù in un'altra.

A Zagabria decidemmo di fermarci per riposarci, presso gli amici della Lega esperantista croata, gustando i piatti locali, sicuramente più gustosi delle nostre ultime scatole di carne.

Ed ecco un altro vagone per Salisburgo, e là un altro collegamento, per Monaco.

Un treno tedesco nuovo, il primo con l'acqua calda (sparimmo tutti e due, uno dopo l'altro, nella toilette, per ritrovare un aspetto umano), per raggiungere la nostra destinazione finale: Amburgo, dopo tre giorni e mezzo dalla partenza, e cinque cambi di treno!

In aereo, oggi, poco più di tre ore: ma quante meno avventure e ricordi!

Tornati in Italia ci separammo a Venezia, andando alle rispettive case o località di ferie dei familiari: comprammo qualcosa da mangiare, ma, dopo un mese tra fiorini, dracme, dinari, scellini, marchi della Germania occidentale e orientale, ci furono problemi per decidere di quante lire era ... 7500 lire!

Uomini, che siete nati e vivete nel mondo dell'euro, non potete capire quanto siete fortunati!

Nel 1984 andai all'IJK nel Regno Unito, a Swanwick, e cambiai treno, o meglio stazione.

Chi oggi entra in aereo nella città A e scende nella città B non può capire cosa significhi scegliere la stazione appropriata per lasciare il treno, e trovare un modo per raggiungere la seconda stazione, in autobus, metropolitana, taxi, a piedi, con lo sguardo continuo all'orologio, sono in ritardo, manca il tempo, come se tu fossi il Bianconiglio di Alice nel Paese delle Meraviglie; ed eccolo, il treno sta per partire subito e si entra nell'ultima carrozza.

E ... non è una semplice carrozza, ma un teatro, e sul palco una banda che vi accompagnerà fino a Boulogne-sur-Mer con un concerto di musica tradizionale

breton: un dolce riposo sia per le gambe che per la mente.

E ecco a Boulogne, ed ecco l'emozione di essere nel luogo dove tutto è cominciato, e guardi i muri alla ricerca delle tracce del primo Universal Kongreso. Ingenuamente sì: ma, secondo me, se non ti emozioni a Boulogne, non hai diritto di definirti esperantista.

E di nuovo un treno per la sede dell'IJK, e un incontro, quasi per caso, con William Auld, di cui avevo appena finito di leggere il libro "Infana Raso".

Durante il gelido inverno tra il 1984 e il 1985, un viaggio a Praga, con cambio di stazione a Vienna, in mezzo alla neve: arrivando a Praga, trovai una temperatura di meno 23 gradi (posso provarlo), e il finestrino del mio scompartimento non si chiudeva bene, quindi ho dovuto prendere dallo zaino tutte le cose calde per affrontare l'ultima ora.

Dal 1987 mi sono allontanato dal movimento, per motivi di lavoro, e non viaggio più tanto in treno.

Ma il mio cuore porta ancora i ricordi di

notte in mezzo ad altri zaini, di lunghe attese in stazioni in mezzo al nulla, di dormite in posizioni che oggi non sopporto più, di treni che i doganieri esplorano con attenzione, in mezzo a odori non sempre gradevoli, col naso al finestrino per vedere i giorni, le sere, le notti, le mattine che si susseguono, sempre con nuovi colori e nuovi occhi.

Grazie, rotaie! Grazie a voi sono diventato un vero cittadino del mondo, ho imparato cosa significa pazienza, ho imparato che un libro è un buon amico e che una bottiglia d'acqua non è una cosa da dimenticare.

E il caffè al mattino, anche se non è il vero italiano, anche se proviene da una macchina da caffè che sembra una betoniera, è un piacere più grande di un nobile vino (beh, se mi dai una bottiglia, possiamo discuterne).

In treno si gode la vita nei piccoli momenti, che si annidano nel proprio cuore, e si sorride anche a quarant'anni di distanza. □

Norberto Saletti

LA TRAJNO IRAS, KAJ NIN FORKUNPORTAS ...

Pri kiom da relkilometroj rakontas mia movada vivo?

Mi eĉ ne povas supozoj la kvanton, sed en mia koro restas la kvalito de tiaj vojaĝoj, kaj mi volas rakonti iom pri ili.

Aviadilo pli rapidas ol trajno, kutime, sed dum surreala itinero vi vidas la ŝanĝojn: de la teritorio, de la homoj kiuj en - kaj eliras la vagonon, de la stacidomoj, de la lingvoj, ĉu parolataj aŭ skribitaj sur la tabuloj, de la odoroj de la kunportataj manĝoj. Vi vivas la vojaĝon, kiu iĝas esenca parto de la aventuro.

Mi ekagadis en 1971, kaj jam ekde la komenco abundis la vojaĝoj, ĉefe ene de mia regiono, do trajne.

Tiam aviadiloj multekostis, do mi iom

post iom al kutimiĝis al vojaĝoj plurhoraj: Mia unua vojaĝo eksterlanden, en 1979, celis la Internacian Junularan Kongreson en Utreĥto, Nederlando, kaj daŭris dek horojn; kiam la trajno atingis Bruselon, mia vagono, la sola kun fincelo al Amsterdamo, restis izolita meze de la fervoja korto dum loooongaj minutoj, atendante la lokomotivon kiu konektis nin al la posta vagonaro.

Sekvan jaron, mi alfrontis longan vojaĝon al la kongresoj en Skandinavio, unue IJK en Raŭmo (Finlando) kaj due UK en Stokholmo (Svedio).

La irvojaĝo estis amuza, kun geamikoj kaj multaj aventuroj, kiel ekzemple kiam, en Hamburgo, ni eliris la vagonon

de la malĝusta flanko, kaj restis solaj meze de la kajoj, sur la teknika trotuaro, antaŭ la gapantaj germanoj...

Ĝuste dum la UK atingis min la informo pri la terorisma atenco ĉe la stacidomo de mia urbo, Bolonjo, kaj mi komencis la 42-horan vojaĝon hejmen, kun tre malmulte da mono en la poŝoj (la kongresaj landoj estis pli multekostaj ol antaŭvidite), kaj kun peza koro, ĉar mi ne estis sukcesinta kontakti mian familion, kiu estus devinta ekvojaĝi al siaj ferilokoj ĝuste en tiu tago, pli malpli je tiu horo.

Mi dormis en la koridoro, ĉar kupeoj tro kostis. La alveno al mia duondetruita stacidomo, meze de la nokto, estas io neforgesebla, kun la ekvalenteco de hodiaŭaj 83 eŭro-centimoj kiel lastaj moneroj, sed el kvar valutoj.

Por ke vi sciu, mia familio bonege fartis, sukcesinte - pro pura hazardo - vojaĝi unu tagon pli frue. Poŝtelefonoj apenaŭ ekekzistis nur en la menso de ties inventontoj: kiom bonŝancaj la hodiaŭaj vojaĝantoj!

Dum 1981 mi ofte vojaĝis trajne inter Bolonjo kaj la montara urbeto Porretta, 60 kilometrojn sude, kie mi kunorganizis Internacian Junularan Festivalon de IEJ: plej ofte, la triklasaj, plej malmultekostaj vagonoj estis la t.n. "Centpordoj", tre malnovaj ĉaroj kun lignaj sidlokoj kaj deko da enirpordoj por ĉiu flanko.

En iu okazo, mi kaj miaj gepatroj vojaĝis tien per vaportrajno "kun antikvaj specialaj vagonoj", kiuj estis ekzakte ... jes, la Centpordoj de la antaŭa semajno. Samjare, mi uzis *Interrail*-on, la unumonatan trajnbiletan por gejunuloj, dum tutmonata vojaĝo tra Hispanio, kaj, alveninte tie, mi eklernis ke nur la lokaj trajnoj estis utiligeblaj sen krompagoj, kaj mi trairis la landon je averaĝa rapido de 20 km/hore.

Mi memoras preskaŭ ĉiun unuopan kilometron, de la halto meze de l'nenio por enirigi kamparon kun du kokoj enmane, ĝis la longa kurbiĝo meze de vinberarboj kiam du kunvojaĝantoj lasis la trajnon, kuris meze de la arboj kaj reeniris la trajnon de l'alia flanko, al la truoj en la neceseja muro tra kiu vi povis saluti l'amikojn dum vi... jes, vi scias; ĝis la cigana festo nokte, flanke de stacidometo en Andaluzio, kiam mi tre malfacile sukcesis ne maltrafi la trajnon.

Dum vojaĝo al estrarkunsido de IEJ, en Pizo, mi eniris malplenan kupeon, kaj eklegis libron: Mi perceptis la eniron de aliaj kunvojaĝantoj, kaj strangan silenton kiu min ĉirkaŭis.

Mi levis la okulojn de mia libro, "La Origino de la Specioj" de Charles Darwin, por rimarki ke mi estis la sola ne pastro en la kupeo.

1983 estis la jaro de mia 26-jariĝo, okazanta en septembro, do mi havis la eblecon ankoraŭ profiti de *Interrail*.

De Italio al Hungario, por IJK en Debrecen kaj UK en Budapeŝto, de tie al Ateno por klasikumi meze de historio, dormante sur la teraso de la Helena Esperanto Asocio.

Kaj, de tie, la plej aventura vojaĝo de mia vivo, bonŝance kun tre kara amikino: Mi ne estus transvivinta, se mi estus vojaĝinta sola. Nome, ni lasis Atenon cele al Saloniko, kie ni elspezis lastajn drakmojn.

De Saloniko alia trajno ĝis Belgrado, en ne tro puraj vagonoj, kie sola libera loko por dormi estis sidante en la vagona latrino, kies pordo ne estis fiksita, kaj frapis sur mian kapon plurfoje dum la nokto (evidente, mi lasis la solan sidlokon kiun ni trovis al mia kunvojaĝantino).

Alvenintaj en Belgrado, ni trafis alian plenŝtopitan trajnon al Zagrebo, kaj dum tiu dua nokto mi dankis la germanajn vagonojn de tiu trajno, kun ties

largaj kaj mallongaj juntoj, kie mi povis trankvile dormi de la talio supren en unu vagono, kaj de la talio suben en alia.

En Zagrebo ni decidis halti por ripozi, ĉe la geamikoj de Kroata Esperanto-Ligo, frandante lokajn pladojn, certe pli bongustajn ol niaj lastaj viandoskatoloj. Kaj jen plia vagono al Salcburgo, kaj tiea plia konekto, al Munkeno.

Nova germana trajno, la unua kun varma akvo (ni ambaŭ malaperis, unu post l'alia, en la necesejo, por repreni homan aspekton), por atingi nian finan celon: Hamburgo, post tri tagoj kaj duono de la ekveturo, kaj kvin trajnoŝanĝoj!

Aviadile, hodiaŭ, iom pli ol tri horoj: sed kiom malpli da aventuroj kaj rememoroj!

Kiam ni revenis al Italio ni disigis en Venecio, reirontaj al la respektivaj hejmoj aŭ familiaj ferilokoj. Ni aĉetis ion por manĝi, sed, post monato inter forintoj, drakmoj, dinaroj, ŝilingoj, okcidentkaj orientgermanaj markoj, ni havis problemojn klopodante decidi kiom da liroj estis... 7500 liroj!

Homoj, kiuj naskiĝis kaj vivas en la eŭra mondo, vi ne povas kompreni kiom vi estas bonŝancaj!

En 1984 mi iris al la IJK en Britio, en Swanwick, kaj mi ŝanĝis trajnon, aŭ pli ĝuste stacidomon.

Tiuj kiuj hodiaŭ eniras aviadilon en la urbo A kaj eliras en la urbo B ne povas kompreni kion signifas elekti la konvenan stacidomon por lasi la trajnon, trovi manieron atingi la duan stacidomon, per buso, metroo, taksio, marŝo, en daŭra rigardo al la horloĝo, mi malfruas, mankas tempo, kiel se vi estus mem la Blanka Kuniklo de Alicia en Mirlando; kaj jen ĝi, la tuj elveturanta trajno, kaj vi eniras la lastan vagonon, kaj ... ĝi ne estas simpla vagono, sed teatro, kaj surpodie muzikgrupo kiu akompanos vin ĝis Bulonjo sur Maro per koncerto de tradicia bretona muziko: dolĉa ripozo kaj por kruroj kaj por menso.

Kaj jen en Bulonjo, kaj jen emocio esti en la loko de kie ĉio komenciĝis, kaj vi gapas al la muroj serĉante spurojn de la Unua UK.

Naive, jes: Sed, laŭ mi, se vi ne emociiĝus en Bulonjo, vi ne rajtus nomi vin esperantisto.

Kaj denove trajno ĝis la IJK-ejo, kaj renkontiĝo, tute hazarda, kun William Auld, kies "Infana Raso" vi estis ĵus finleginta.

Dum la gela vintro inter 1984 kaj 1985, vojaĝo al Prago, kun stacidom-ŝanĝo en Vieno, meze de neĝado: Alveninte en Prago, mi alfrontis temperaturon de minus 23 gradoj (mi povas pruvi tion), kaj la fenestro de mia kupeo ne bone fermiĝis, do mi bezonis forpreni de la dorsosako ĉion varman, por alfronti la lastan horon.

Ekde 1987 mi iom kabeiĝis, pro laboraj kialoj, kaj ne plu tiom trajnis.

Sed mia koro portas ankoraŭ la memorojn pri noktoj meze de aliaj dorsosakuloj, pri longaj atendoj en stacidomoj meze de l'nenio, pri dormoj en pozicioj kiujn mi hodiaŭ ne plu povas elteni, pri trajnoj kiujn doganistoj esploras atente, meze de odoroj ne ĉiam agrablaj, kun la nazo al la fenestro por vidi tagojn, vesperojn, noktojn, matenojn sekvi unu l'alian, ĉiam kun novaj koloroj kaj novaj okuloj.

Dankon, reloj! Per vi, mi fariĝis vera civitano de la mondo, mi lernis kion signifas pacienco, mi eksciis ke libro estas bona amiko, kaj ke botelo da akvo ne estas io forgesenda.

Kaj kafo matene, eĉ se ne vera itala, eĉ se venas el kafmaŝino kiu similas betonmaŝinon, estas plezuro pli granda ol ajna nobla vino (nu, se vi donacas botelon al mi, tion ni povas diskuti).

Trajne oni ĝuas sian vivon en la etaj momentoj, kiuj nestiĝas en la koro, kaj produktas ridetojn eĉ kvardek jaroj poste. □

Norberto Saletti

La frenatura dei treni produce energia.

Recuperare energia dalla frenatura dei treni per accendere le luci in città. Paradossi dell'economia circolare che, con la complicità di un investimento tecnologico, consentono oggi di fare il salto da un uso lineare delle risorse, in questo caso del consumo di energia elettrica, ad un uso circolare in cui tutto si riusa e nulla si spreca.

È il nuovo progetto che il Gruppo FS Italiane sta mettendo a punto nella stazione di Forlì sulla linea Bologna-Rimini, un prototipo che sarà inaugurato entro l'estate, tipico esempio virtuoso di un modello economico che prevede un uso circolare delle fonti di energia, in questo caso attraverso il recupero di energia elettrica che alimenta le linee ferroviarie: l'energia della frenata dei treni viene re-immessa in rete.

Le sottostazioni reversibili permettono all'energia di fluire non solo dalla rete elettrica al treno, come accade ora, ma anche dal treno alla rete elettrica. L'energia può essere così recuperata e tornare al suo gestore.

I treni a trazione elettrica offrono la possibilità, durante la fase di frenatura, di sfruttare l'energia resa disponibile e di impiegarla ad esempio per altri treni presenti sulla linea o in altri modi.

Il treno *Frecciarossa 1000*, ad esempio, è capace di restituire in media il 15% dell'energia prelevata.

Sulle linee AV, a 25kVca, la naturale reversibilità delle sottostazioni permette di sfruttare a pieno l'energia elettrica recuperata in fase di frenatura.

Sulle linee a 3kVcc, che rappresentano il 95% dell'infrastruttura di RFI, al momento, essendo le sottostazioni non

